Jaro V. Novembro, 1923. Numero 3

BULGARA ESPERANTISTO

ABONPAGO:
por Bulgarlando 30 levoj, por fremdlando: bonvalutaj 60 lv., malbonvalutaj 40 levoj.

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

АБОНАМЕНТЪ:
за България 30 лв.
Обявления: кв. см. 2 лева
Отделенъ брой 3·50 лева

Препоржчано отъ М-о Н. Пр. за учил. библ. съ окр. № 1870 отъ 27. I. 1922

Културната дейность на есперантиститѣ.

„Обнова! Просвѣта! Култура“! Отъ десетина години насамъ слушаме този повикъ въ нашата страна. Много красиви слова се казаха за тѣзи нѣща по разнитѣ културни тържества, много статии се написаха, много мастило се похаби.

Но докато едни само говорѣха и говорятъ и до сега за тѣзи красиви нѣща, като се задоволяватъ да сочатъ светлия връхъ, къмъ който трѣбва да се върви, безъ обаче да тръгнатъ по трудния пжть, който извежда до този връхъ, — други, скромни труженици, безшумно работятъ за просвѣтата и културата на народа, за умственото подигане и превъзпитание на широкитѣ народни маси и вършатъ великото дѣло на обновата, често гледани съ присмѣхъ и пренебрежение тъкмо отъ тѣзи, които най-много викатъ за просвѣта и култура. Това сж хилядитѣ ратници, които работятъ въ разнитѣ културно-просвѣтни организации въ градове и села.

Едни отъ най-малко ценнитѣ до сега културно-просвѣтни

La kultura agado de la esperantistoj.

„Renoviĝo! Klereco! Kulturo!“ depost dek jaroj ni aŭdas tiun vokon en nia lando. Multajn belajn parolojn oni diris pri tiuj aferoj en la diversaj kulturaj solenoj, multajn artikolojn oni skribis, multan inkon oni uzis.

Sed dum unuj nur paroladis kaj ankaŭ nun paroladas pri tiun belaj aferoj, kontentigante siu montradi la luman supron, al ki oni devas marŝi, tamen ne eki rante mem sur la malfacila vojo kiu kondukas al tiu supro — aliaj, modestaj agantoj senbrue laboradas por la klerigo kaj kulturo de la popolo, por la intelekta altigo kaj por la reeduko de la larĝaj popolamasoj, kaj faras la grandan aferon de la renovigo, ofte estante rigardataj kun mokemo kaj malŝato ĝuste de tiuj, kiuj plej multe kriadas pri klereco kaj kulturo. Tio estas la miloj da laborantoj, kiuj agadas en la diversaj kultur-klerigaj organizaĵoj en urboj kaj vilaĝoj.

Unuj el la plej malmulte ŝatataj ĝis nun kultur-klerigaj orga-

организации сѫ есперантскитѣ. Мнозина „радетели“ за обновата се отнасятъ често съ крайно пренебрежение къмъ дейностьта на есперантиститѣ, а нѣкѫде дори и съ нескривана неприязненость. Такива обновители не могатъ да разбератъ, че дѣлото на обновата е едно сложно, многостранно дѣло, което се изгражда съ усилията и дейностьта на най-различни организации, и въ това не бива да се подценява дейностьта и усилията на никоя отъ тѣхъ.

За какво работятъ българскитѣ есперантисти, организирани въ своето Българско Есперантско Дружество и въ мѣстнитѣ му секции! Тѣ искатъ да разпространятъ едно просто, практично и достѫпно средство за международни сношения. Тѣ увеличаватъ съ своята дейность броя на тѣзи българи, които владеятъ чуждъ езикъ и които сѫ въ прѣки сношения съ чужденци. Сношенията съ чужденци и участието въ международния животъ иматъ голѣмо влияние въ възпитанието и умственото подигане на индивида. Това трѣбва да разбератъ всички интелигентни българи, които желаятъ искрено обновата, просвѣтата и културата на нашия народъ. Колкото повече Есперанто се разпространява у насъ, толкова повече български синове ще се свържатъ съ другитѣ народи, толкова повече и ще се чувствува лъхътъ на цивилизацията въ широкитѣ народни маси. Защото умственото подигане на тѣзи маси не може да стане изведнажъ и всеобщо, а то е единъ

nizajoj estas la esperantistaj. Multaj „bondezirantoj“ de la renovigo rilatas ofte kun ekstrema ignoro al la agado de la esperantistoj, kaj eĉ ie kun nekaŝata malfavoro. Tiaj renovigemuloj ne povas kompreni, ke la afero de la renovigo estas afero malsimpla, multeflanka, kiu estas konstruata per la penoj kaj per la agadoj de plej diversaj organizajoj, kaj en tio oni devas subtaksi la agadon kaj la penadon de neniu el ili.

Por kio laboras la bulgaraj esperantistoj, organizitaj en sia Bulgara Esperantista Societo kaj en ĝiaj lokaj sekcioj? Ili deziras disvastigi unu simplan, praktikan kaj akireblan de ĉiuj rimedon por internaciaj rilatoj. Ili plimultigas per sia agado la nombron de tiuj bulgaroj, kiuj posedas fremdan lingvon kaj kiuj havas senperajn komunikojn kun fremduloj. La komunikojn kun fremduloj kaj la partopreno en la internacia vivo havas grandan influon en la edukado kaj la intelekta altiĝo de la individuo. Tion devas kompreni ĉiuj, kiuj deziras sincere la renovigon, la klerigon kaj kulturigon de nia popolo. Ju pli Esperanto disvastiĝas ĉe ni, des pli da bulgaraj filoj ligos sin kun la ceteraj popoloj, des pli ankaŭ estos sentata la alblovo de la civilizeco ĉe la popolaj amasoj. Ĉar la intelekta altiĝo de tiuj amasoj ne povos fariĝi spontane kaj ĝenerale, sed ĝi estas unu malrapida procedo; por ĝin atingi oni devos ekiri de la unuo, oni devos kreadi intelekte altigitajn individuojn kaj multigadi ilian kvanton.

бавенъ процесъ; за неговото постигане трѣбва да се тръгне отъ единицата, да се създаватъ умствено издигнати индивиди и да се увеличава броятъ имъ.

Спомага ли Есперанто да се създадатъ такива индивиди въ разнитѣ обществени слоеве?— Този въпросъ трѣбва да заинтересува интелектуалнитѣ водачи на народа и, ако намерятъ положителенъ отговоръ, тѣ трѣбва да ценятъ дейностьта на есперантиститѣ и да се радватъ на тѣхнитѣ успѣхи.

Ĉu Esperanto helpas por la kreado de tiaj individuoj en la diversaj sociaj klasoj? — Tiu ĉi demando devos interesigi la intelektajn gvidantojn de nia popolo, kaj, se ili trovos pozitivan respondon, ili devos ŝati la agadon de la esperantistoj kaj ĝoji pri iliaj sukcesoj.

Ние можемъ безъ колебание да заявимъ, че чрезъ Есперанто много българи, свързани съ чуждестранци, сж придобили по-обширенъ кржгозоръ, по-голѣми културни интереси, наклонность къмъ обществено-просвѣтна дейность и стремежъ къмъ самообразование.

Ni povas senhezite deklari, ke per esperanto multaj bulgaroj, ligitaj kun fremduloj, estas akirintaj pli vastan intelektan horizonton, pli grandajn kulturajn interesojn, emon al publika kleriga agado kaj celado al memkleriĝo.

Да вземемъ за примеръ едно момче, каквото е малкиятъ ни съидейникъ Вили Ганчевъ. Още въ III прогимназиаленъ класъ, въ вечеренъ курсъ по есперанто за граждани, той изучава вжтре въ два—три месеца есперанто. На 14-годишна възрасть това момче кореспондира, размѣня марки, илюстровани картички и пр., съ връстници отъ около 15 различни страни на земята. Освенъ това то има случай да разговаря съ загребски, холандски и австралийски есперантисти. Кое дете на тази възрасть може да постигне това? И малко ли значение има за неговото възпитание и образование тази преписка и тѣзи сношения съ чужденци? Ами съзнанието на това дете, че за него свѣтътъ не е за-

Ni montru ekzemple knabon, kia estas nia malgranda samideano Vili Ganĉev. Estante ankoraŭ en la III progimnazia klaso, li ellernas Esperanton en 2—3 monatoj en vespera kurso por geurbanoj. En sia 14-jara aĝo tiu knabo korespondas, interŝanĝas markojn, ilustritajn kartojn k. a., kun samaĝuloj el proksimume 15 diversaj landoj de la tero. Krome li havas okazon interparoli kun zagrebaj, holandaj kaj aŭstralia esperantistoj. Kiu infano en tiu aĝo povas atingi tion? Kaj ĉu malgrandan signifon havas por lia edukiĝo kaj instruiĝo tiu korespondo kaj tiuj komunikoj kun fremduloj? Kaj la konscio de tiu infano, ke por li la mondo ne estas fermita, ke li ne estas muta antaŭ fremduloj, kiel tiom multe da plenaĝaj inteligentaj viroj? Kaj krome la konscio, ke li

творенъ, че то не е нѣмо предъ чужденеца, както толкова много възрастни, ителигентни мѫже? А при това и съзнанието му, че то е постигнало този резултатъ съ своя трудъ — нима това съзнание не ще го подтикне да се труди и да постигне такива резултати и въ другитѣ области, дето борави?[1])

Ето единъ работникъ — нашиятъ отдавнашенъ и много заслужилъ съидейникъ Милчо Георгиевъ. Отъ младежки години той чете и кореспондира на есперанто, и този животъ създава у него интересъ къмъ четене и умствени занятия, въобще, стремежъ къмъ самообразование, и го подтиква да отиде и види чуждия животъ, чуждата култура. Два пѫти той чрезъ помощьта на Есперанто ходи до Франция. — Не по-малко ярѫкъ примеръ представя другъ единъ съмишленикъ — пакъ работникъ — Ангелъ Николовъ, а бихме могли да посочимъ още съ десетки, та дори и стотици български работници, които благодарение на Есперанто и есперантския животъ сѫ се самообразовали и сѫ се издигнали значително надъ своитѣ другари по умственъ уровенъ и културни интереси.

---

[1]) Тукъ мога да отбележа, че две години следъ това сѫщиятъ малъкъ есперантистъ се зае да изучава като самоукъ английски езикъ. Този фактъ иде да подчертае нашето твърдение, което нееднократно сме изказвали въ това списание, че есперанто не убива интереса къмъ чужди езици, а напротивъ, въ много случаи го създава, и постигнатитѣ въ него самия резултати усилватъ вѣрата на ученика, че ще може да постигне такива и въ другитѣ изучавани езици.

atingis tiun rezulton per sia laborado — ĉu tiu konscio ne akcelos lin laboradi por atingi tiajn rezultojn ankaŭ en la ceteraj regionoj, kie li laboras? [1])

Jen laboristo — nia malnova kaj multmeritinta samideano Milĉo Georgiev. En junula aĝo jam li legas kaj korespondas en esperanto, kaj tiu vivo kreas ĉe li intereson pri legado kaj pri mensaj okupoj ĝenerale, emon al memklereĝo, kaj akcelas lin iri kaj vidi la fremdan vivon, la fremdan kulturon. Dufoje li per la helpo de Esperanto vizitis Francion. — Ne malpli brilan ekzemplon prezentas alia samideano, same laboristo — Angel Nikolov, kaj ni povus montri dekojn, eĉ centojn da bulgaraj laboristoj, kiuj dank' al Esperanto kaj al la esperantista vivo estas memkleriĝintaj kaj altiĝintaj rimarkinde super siaj kamaradoj laŭ intelekta nivelo kaj kulturaj interesoj.

---

[1]) Tie ĉi mi povas noti, ke post du jaroj de kiam li lernis Esperanton, la sama malgranda esperantisto komencis lerni aŭtodidakte la anglan lingvon. Tiu fakto venas subteni nian aserton, ne nur unufoje esprimitan en tiu ĉi gazeto, ke esperanto ne mortigas la intereson pri fremdaj lingvoj, sed kontraŭe, en multaj okazoj kreas tian, kaj la atingitaj en ĝi mem rezultoj plifortigas la kredon de la lernanto, ke li povos atingi samajn ankaŭ en la ceteraj lernataj lingvoj.

Нима е безъ значение и фактътъ, че, докато хиляди наши интелигентни българи, съ срѣдно и висше образование, стоятъ като нѣми предъ чужденци, не могатъ да изразятъ две мисли, единъ селянинъ-дърварь отъ Батакъ, самоукътъ Петъръ Тошковъ, въ 1909 година въ Букурещъ, часъ и половина говорй отъ сцената на театъра Liedertafel предъ препълненъ салонъ?

Ако тѣзи факти — съ каквито впрочемъ изобилствува нашиятъ есперантски животъ — не значатъ нищо за интелигентния радетель за обновата и културното подигане на народа, тогава какъ си представлява той тази обнова и това културно подигане? Какво очаква той по-ценно, по-значително въ процеса на просвѣтата и културата въ народнитѣ маси?

Единъ искренъ ратникъ за обнова, просвѣта и култура въ народа трѣбва да желае, щото между нашата младежь да се създадатъ повече Вили Ганчевци, между нашето работничество повече Милчо Георгиевци и Ангелъ Николовци, между нашитѣ селяни повече Петъръ Тошковци! Това ще допринесе много по-голѣми резултати въ дѣлото на народното просвѣтяване, отъ хиляди хубави слова и подканвания къмъ просвѣта и култура.

Но нашитѣ есперантски организации, покрай дейностьта си да създаватъ повече единици, които владѣятъ и си служатъ съ есперанто, твърде често иматъ и много по-обширна и многостранна дейност. На много мѣста есперантскитѣ групи сж настоящи мѣстни чита-

Ĉu estas sensignifa ankaŭ la fakto, ke, dum miloj da niaj inteligentaj bulgaroj kun mezgrada kaj universitata instruiteco, staras kvazaŭ mutaj en ĉeesto de fremduloj, ne povante esprimi eĉ du pensojn, unu vilaĝano-arbohakisto el Batak, la aŭtodidakto Petr Toŝkov, en 1909 en Bukureŝto dum unu horo kaj duono parooladis sur la scenejo de la teatro Liedertafel antaŭ plenplena salono?

Se tiuj faktoj — per kiaj cetere abundas nia esperantista vivo — havas nenian signifon por la inteligenta laboranto por la renoviĝo kaj kultura altiĝo de la popolo, kiel do li prezentas al si tiun renoviĝon kaj tiun kulturan altiĝon? Kion li atendas pli valoran, pli signifoplenan en la procedo de la klerigado kaj de la kulturiĝo de la popolaj amasoj?

Sincera batalanto por renoviĝo, klerigo kaj kulturo de la popolo devas deziri, ke inter nia junularo kreiĝu pluraj Vili Ganĉev'oj, inter nia laboristaro — pluraj Milĉo Georgiev'oj kaj Angel Nikolov'oj, inter nia vilaĝanaro — pluraj Petr Toŝkov'oj! Tio alportos multe pli grandajn rezultojn en la afero de la popola klerigado, ol miloj da belaj paroloj kaj akceloj al klerigo kaj kulturo.

Sed niaj esperantistaj organizajoj, krom sia agado kreadi plurajn individuojn, posedantajn kaj uzantajn esperanton, tre ofte havas ankaŭ multe pli vastan kaj multeflankan agadon. En multaj lokoj la esperantistaj grupoj estas veraj lokaj legosocietoj[1]) kaj gvi-

[1]) La organizajojn de la publikaj bibliotekoj oni nomas ĉe ni „legejoj" aŭ „legosocietoj".

лица и водители на културно-просвѣтния животъ. Така напр. въ гр. Кърджали есперантското дружество „Stelo“ застана начело на мѣстнитѣ културно-просвѣтни дружества, и даде инициативата да се започне съ усилията на всички постройката на театраленъ и читалищенъ салонъ въ града. Есперантската група въ гр. Неврокопъ разучи и представи (на български) Яворовата драма „Въ политѣ на Витоша“ — първото по-сериозно театрално представление въ този македонски градъ. При сѫщата група се уреди и духовъ оркестъръ. Не по-малка общокултурна дейность проявява и есперантската група въ гр. Мехомия, а и за много наши мѣстни групи могатъ да се отбележатъ такива факти, които ни даватъ право да твърдимъ, че есперантскитѣ организации, наредъ съ останалитѣ културно-просвѣтни дружества въ страната, допринасятъ своя дѣлъ въ общото дѣло на народната просвѣта, и тѣхната дейность трѣбва да бѫде ценена отъ всѣки искренъ приятель на народа ни.

За това ние есперантиститѣ съ право очакваме, че въ своята дейность ще намеримъ пълна подкрепа както отъ официялнитѣ представители на народната просвѣта, тъй и отъ сроднитѣ намъ организации — читалища и всѣкакви идейни и културно-просвѣтни дружества — които преследватъ общата примамлива цель: умственото и нравствено подигане на народа, за да може той достойно да върви, редомъ съ другитѣ народи, по пѫтя на напредъка.

dantoj de la kulturkleriga vivo. Tiel ekzemple en Kirĝali la esperantista societo „Stelo“ ekstaris en la fruntloko de la tieaj kulturklerigaj societoj kaj donis la iniciativon, ke oni komencu konstruadon de teatra kaj lega salono en la urbo per la peno de ĉiuj. La esperantista grupo en Nevrokop lernis kaj prezentis (bulgarlingve) la dramon de Javorov „Ĉe la piedoj de Vitoŝa“ — la unua pli serioza teatra prezentado en tiu macedona urbo. Ĉe la sama grupo estis fondita ankaŭ blovinstrumenta orkestro. Ne malpli grandan ĝeneralkulturan agadon montras ankaŭ la esperantista grupo en Meĥomio, kaj ankaŭ pri multaj niaj lokaj grupoj ni povus noti tiajn faktojn, kiuj donas al ni rajton aserti, ke la esperantistaj organizajoj, vice kun la ceteraj kultur-klerigaj societoj en nia lando, alportas sian parton en la komuna afero de la popola instruado, kaj ilia agado devas esti ŝatata de ĉiu sincera amiko de la popolo.

Tial ni, la esperantistoj, rajte atendas, ke en nia agado ni trovos plenan subtenon kiel de la oficialaj reprezentantoj de la popola instruado, tiel ankaŭ de la parencaj al ni organizajoj — la legejoj kaj ĉiaj ideaj aŭ kulturklerigaj societoj — kiuj persekutas la komunan allogantan celon: la intelektan kaj moralan altiĝon de nia popolo, por ke ĝi povu inde marŝi, vice kun la ceteraj popoloj, en la vojo de la progreso.

Само единъ врагъ на културата и прогреса може да откаже своята помощь и да противодействува на дѣлото на есперантиститѣ.

Ат. Д. Атанасовъ.

Nur malamiko de la kulturo kaj progreso povus rifuzi al ni sian helpon kaj kontraŭstari al la esperantista agado.

At. D. Atanasov.

Ree . . .

Al la amikino.

Tra l' brancoj mallumaj sibladas la vento
ĉe l' branĉa lamento,
Kaj tiel malvarmas la nokto senluna,
la nokto aŭtuna! . . .

Mi ploras. Kaj antaŭ larmozaj okuloj
rondtremas nebuloj.
Ho — tia malĝojo, doloro, turmento
sub mia tegmento!

Kaj vi plu ne venas, ho kara infano,
kun floroj en mano . . .
Mi tion komprenas — forvelkis la floroj,
forvelkis la koroj . . .

Kaj ree naskitis, ho ve, senkonsolo
en mia la solo.
Kaj ree mi ploras . . . Sur mia tegmento
sibladas la vento.

Miti.

Amo.

Mi serĉas vin, ho mia amatino nekonata
Kaj ĉiunokte sonĝas mi figuron de anĝelo
En vestoj pli-brilantaj ol la steloj de l' ĉielo . . .
Kaj kredas mi, ke venas jam la tago atendata,
Ĉar longe mi atendis kun sopiro,
Kaj sole vin prikantas mia liro!

Mi serĉas vin . . . sed ne en urboj arte ornamitaj
En kiuj regas la vanteco kaj la falsestimo,
Kaj kie ĉiuj homoj vivas en konstanta timo,
Ke Morto venos por iliaj korpoj lacigitaj,
Ĉar karno estas tie Dio adorata,
Kaj la purec' anima — forpelata . . .

Mi serĉas vin en la kuŝejo de Patrin' — Naturo
Dumnokte, kiam ĉio dormas en mirinda paco . . .
Spirito mia trovos Vin en la senfina spaco,
Kaj kison metos mi sur vian buŝon de purpuro —
Eternan kison de senmorta amo,
Kun sorĉa bril' — neestingebla flamo!

Sim. M. Simeonov.

Nikolaj Rajnov.

En la dezerto enterigu min!

Kiam mi mortos, en la dezerto enterigu min: tie enterigu la kantiston el Nordo!

Malproksime de la tendoj forportu min, vi, miaj brunkoloraj fratoj: en la sablo enterigu korpon mian!

Mi vidis la junan Mugal'on, kiun oni alportis, mortinta, sur bambuaj branĉoj.

Mortigis lin krimuloj.

Okuloj liaj estis sangoplenaj kaj rigardis kiel okuloj de sensaĝulo: tiel ankaŭ miaj okuloj rigardos, kiam mi mortos...

Mi aŭdis la maljunulon Taleb'on kantantan mezonokte antaŭ la tendoj de la gento.

Lia voĉo tremetis kiel kordo de liro kaj en la kanto ploradis la ĉagreno de ĉiuj malesperiĝintoj: tiel ankaŭ kantos mia animo, kiam mi mortos... Senhejme mi vivis — senhejman kanton kantados animo mia tra la dezerto...

Mi vivis inter brunkoloruloj. La blankulojn mi malamis. Mia animo neniun blankulon vidas:. ĉe brunkoloruloj enterigu min, miaj brunkoloraj fratoj!

Animo mia estis senhejma — kaj mia paŝo flugis kiel ventego de maro al maro.

Kaj bastonegon mano mia ne trovis por apogi sin...

Mi vidis la blindulon Rufet'on, kiun nigra serpento estis ekmordinta.

Li konvulsiis pro doloro kaj kriegis kiel sensaĝulo.

Tiel ankaŭ tutan vivon konvulsiis mia animo. Tiel kriis mia animo tutan vivon. Neniu zorgis pri mi — kaj neniu demandis min, kio doloriĝas min.

Kiel dezerto silentis animo mia — kaj al neniu plendis mi, miaj brunkoloraj fratoj! — —

En la dererto enterigu min — en la ruĝa sablo de la Dezerto, — ĉar en soleco mi volas priplori min mem, kiam mi mortos! — —

Mi aŭdis Nefret'on, kiel ŝi dormigis sian malsanan infanon.

Tirvoĉe kaj malrapideme kantis Nefret, kaj larmoj gutis el ŝiaj okuloj — kaj ŝiaj palpebroj estis malsekaj kiel piedoj de fiŝkaptisto.

Ploro estis en ŝia kanto. En plorado mi vivis tutan vivon: ploro estos ankaŭ mia morto.

Ne venos — scias mi — ne venos la junulinoj de la gento por priplori min, ĉar en la tendoj mi fremdulo estis.

Miaj ĉagrenantinoj estos la turnoventoj de la dezerto — kaj la brunkoloruloj forgesos min.

Sed kiam dumnokte ekblekegos frenezaj turnoventoj kaj nuboj de sablo portiĝados al la oazoj, aŭskultos blankharaj beduenoj, kamelistoj mallevos kapon — kaj eble iu diros ĉagrene — iu el la multnombraj:

„Tie ploras la kantisto el Nordo. Senrifuĝe vivis ĉe ni la blankulo, senrifuĝe li mortis. — —

„Kaj jen — li ploras . . .

„La Profeto memoru la kantiston el Nordo: li amis nin — li amis la brunkolorulojn! Kaj ni forgesis lin — kaj nur la Dezerto ploras pri tiu, kiu pleje amis ĝin.

„Lia animo vagadas — kaj plorado estis lia lasta kanto!...“

Trad. **Sim. M. Simeonov.**

Нашата преса и Есперанто.

Преди четири години Централниятъ Комитетъ на Българското Есперантско Дружество отправи къмъ редакциитѣ на софийскитѣ ежедневници едно писмо, въ което, като изтъкваше, че въпреки ранната поява на Есперанто у насъ и дългогодишната дейность на българскитѣ есперантисти, голѣма часть отъ българската интелигенция нѣма истинска представа за сжщностьта на есперанто и на есперантското движение, а твърде често има превратни и чудовищни понятия за него, молѣше представителитѣ на българската преса да даватъ мѣсто въ своитѣ издания на съобщения и кратки статии за есперанто, защото пресата е тъкмо призвана да представя нѣщата въ сжщинския имъ ликъ и да служи за проводникъ на новитѣ благородни и хуманни идеи и обществени течения. На този апелъ отговориха нѣколко редакции — кои писмено, кои устно — като обещаха да помѣстватъ, доколкото малкиятъ обемъ на изданията имъ позволява, съобщения за есперанто.

За жалость ние трѣбваше да констатираме, че по-голѣмата часть отъ българската преса и следъ това не помѣстяше тѣзи съобщения, които й се пращаха отъ есперантиститѣ, и които можеха най-ясно да илюстроватъ сжщностьта и размѣра на есперантското движение. Напротивъ, имахме нѣколко пжти случаи да видимъ, какъ въ български вестници и списания се помѣстваха тенденциозни и невѣрни съобщения за есперанто, безъ да се помѣстватъ следъ това и отговоритѣ и опроверженията, които отдѣлни есперантисти или самото Бълг. Еспер. Д-во даваше. Така следъ VIII бълг. еспер. конгресъ въ много вестници се появи една еднообразно редактирана бележка за последното заседание на конгреса съ явно тенденциозна умисъль да компрометира есперантското движение, а никой вестникъ не благоволи да напечата опроверженията, които се пратиха своевременно и отъ отдѣлни есперантисти, и отъ страна на дружеството. По-късно в. Миръ помѣсти една тенденциозна статия „Проф. Мейе за междунар. езикъ“, въ която се цитираше с т а р о т о мнение на проф. Мейе, а най-новото се премълчаваше (може би, защото и самъ авторътъ на статията не го е знаелъ). Речениятъ вестникъ не напечата обаче и статията отговоръ по сжщия въпросъ. Читателитѣ ни си спомнятъ за статията на г. Божанъ Ангеловъ въ „Демокрация“, на г. проф. Ст. Младеновъ въ „Българска речь“, на г. Т. Кжневъ въ „Развигоръ“ — при които случаи редакциитѣ проявиха голѣма благосклонность къмъ статиитѣ, неблаго-

приятни къмъ Есперанто, и неохотность да помѣстятъ отговоритѣ на есперантиститѣ.

Всичко туй създаваше у есперантиститѣ убеждение, че българскитѣ публицисти сж неприязнено настроени къмъ есперанто и че тѣ помѣстватъ предимно и по на драго сърце антиесперантски статии. Тъй че нашата преса не даде едно вѣрно осветление на обществото по въпроса за есперанто и много факти сигурно се посрещнаха съ недоумение отъ българската публика.

Още презъ есеньта на 1921 год. въ Обществото на народитѣ делегациитѣ на 11 държави внесоха предложение въ Обществото за въвеждане на есперанто въ училищата на всички страни. Малко наши вестници отбелезаха този фактъ, макаръ че Бълг. Еспер. Д-во даде съобщение въ всички редакции. Обществото на народитѣ реши тогава да произведе една анкета за състоянието на есперанто въ свѣта и за приложимостьта му. Въ продължение на една година секретариятъ му събира сведения чрезъ просвѣтнитѣ министерства и чрезъ есперантскитѣ организации въ всички страни. И това нашата преса премълча.

Презъ м. априлъ 1922 год въ Женева се събра международна конференция за преподаване на Есперанто въ училищата. Тази конференция на специалисти-педагози и учители по есперанто заседаваше въ палатата на Обществото на народитѣ. При откриването ѝ главниятъ секретарь на Обществото, сэръ Ерикъ Друмондъ, въ приветствената си речь заяви, че изводитѣ отъ разискванията ѝ ще бждатъ отъособенъ интересъ за О. Н., на което предстои въ близката сесия да се занимае съ въпроса за есперанто. Изводитѣ на конференцията говорятъ изключително въ полза на есперанто. Но и за тази конференция българската преса не писа нищо.

Презъ септември 1922 год. въ сесията на О. Н. се внесе на разглеждане рапортътъ на секретаря за извършената анкета досежно сжщностьта, приложението и разпространението на есперанто. Преди това този докладъ бѣ проученъ отъ специална комисия, която направи нѣкои добавки, съкращения и измѣнения, и въ такъвъ видъ той се внесе въ пленарно заседание. Тъй че той не е нѣщо инцидентно прието, а е плодъ на сериозно проучване и дебатиране. Въпреки противодействието на френската делегация, рапортътъ бѣ приетъ съ голѣмо болшинство. А той самъ по себе си е една защита на есперанто. — И за това нашата преса не спомена нито дума.

Споменахме, че френската делегация се опита да противодействува. Това бѣ по заповѣдь. Нѣкои отъ официалнитѣ кржгове въ Франция бѣха видѣли въ силното разпространение на есперанто една опасность за разпространението и международното влияние на френския езикъ, и бѣха решили да поведатъ борба срещу есперанто. Борбата предъ Обществото на народитѣ не успѣ; френската делегация успѣ само да прокара едно решение: да се покани и интелектуалната комисия при Обществото да проучи въпроса и да представи своето мнение. — Въ самата Франция министра на народната просвѣта Бераръ почна борбата съ едно окржжно, чрезъ което забраняваше преподаването на Есперанто въ френскитѣ университети. Тогава се почна една оживена полемика въ френскитѣ вестници, която трая около три-

месеца, и въ която взеха участие именити личности и отъ двата лагера: за и противъ есперанто. Противницитѣ поддържаха, че есперанто ще попречи на френското влияние и на френския езикъ. Защитницитѣ отговаряха, че французитѣ сж предъ дилемата: или да се разпространява английскиятъ езикъ, съ който върви и английското политическо и економическо влияние, което тъкмо е опасното за Франция, или да се разпространява есперанто, задъ който не стои никоя нация съ свои интереси; отъ двѣтѣ злини тѣ предлагаха да се предпочете по-малката. Въобще въ тѣзи разправии шовинистичнитѣ мотиви бѣха изтъквани на първо мѣсто, а възраженията отъ сжществено значение (филологически, социологически и пр.) противъ международния езикъ бѣха второстепенни. Докато въ началото противницитѣ бѣха твърде остри и категорични, къмъ края на тази борба тѣ смегчиха тона. Самиятъ министъръ излезе да обясни въ в. „Le Temps“ (отъ 8. I. 1923 г.), че не сж го разбрали добре, че „окржжното отъ 3 юний не отрича на най-малко високата цель, която си поставятъ есперантиститѣ“ и пр.

Въ тази полемика френскитѣ вестници се показаха „по-прости“ отъ българскитѣ си събратя. Тѣ дадоха мѣсто на статии както противъ, тъй и за есперанто, често на уводно мѣсто. Можемъ ли да си представимъ, че нашата „сериозна“ преса би дала уводно мѣсто на статия за есперанто?

Както и да е, Франция се зае да нанесе ударъ на Есперанто, следъ като последниятъ има успѣхъ предъ Обществото на народитѣ (съ приемане на рапорта, за който споменахме по-горе), като прокара една неблагоприятна резолюция на интелектуалната комисия при Обществото. (Сжщата Франция действува въ реченатa комисия и за да не се приема инициативата за събиране на помощи за бедствуващитѣ немски учени, обаче не успѣ, и когато комисията издаде своя апелъ, френскитѣ шовинистични вестници доста хули изсипаха по това благородно начинание). По въпроса за Есперанто, обаче, Франция успѣ да прокара въ едно набързо претупано заседание на интелектуалната комисия въ тазесенната сесия на Обществото една резолюция, съ която комисията се резервира да не препоржчва единъ изкуственъ международенъ езикъ. Шовинистичната преса въ Франция, подготвена за случая, гръмва веднага по поводъ тази резолюция. Агенция „Хавасъ“ я разглася.

Отъ тамъ в. „Миръ“ взима резолюцията и подъ тенденциозното заглавие „Обществото на народитѣ противъ есперанто“ я предава малко съкратена и малко по-остра, отколкото е въ действителность.

Обаче какво излиза? Предложена на Обществото въ пленарно заседание, р е з о л ю ц и я т а п р о п а д а. Два пжти френскиятъ докладчикъ я прередактира и я предлага въ по-мека форма, и н а й-н а к р а я я о т т е г л я. И тъй, Обществото на народитѣ не възприе резолюцията, която подигна толкова шумъ въ Франция, чийто отгласъ се чу и у насъ чрезъ в. „Миръ“. Въ случая в. „Миръ“, безъ да знае на каква борба е станалъ отзвукъ, въ единъ моментъ на тази борба, като е смѣталъ, че дава една последна дума, е станалъ проводникъ на едно прибързано съобщение.

Следваше, разбира се, в. „Миръ" да съобщи и за това, че фактически тази резолюция е отхвърлена отъ Обществотото на народитѣ и не представлява документъ. Отъ редакцията на „Bulgara Esperantisto" бѣ пратено както нему, тъй и на всички редакции, бележката за есперанто предъ Обществото на народитѣ, която се появи по-късно и въ нашия органъ (бр. 2, стр. 28). Обаче нито в. „Миръ" нито кой и да е другъ вестникъ благоволиха да отбележатъ този фактъ и да поправятъ едно неточно и тенденциозно съобщение.

Като отбелѣзваме съ прискърбие това, ние бихме желали да вѣрваме, че представителитѣ на нашата преса ще разбератъ най-сетне, че есперантското дѣло е чисто културно-просвѣтно, отъ което може да се очакватъ само ползи както за отдѣлната личность, тъй и за народа, а сѫщо и за цѣлото човечество, и не бива да затварятъ своитѣ колони за популяризирането на това дѣло всредъ нашия народъ. Нека се надѣваме, че тѣ ще оценятъ неуморния трудъ на българскитѣ есперантисти, който има за резултатъ да се отворятъ очитѣ на повече български граждани и, като имъ се даде едно практично средство за международни сношения, да имъ се открие пѫтя на общочовешкия животъ. На това дѣло трѣбва да симпатизира всѣки, който милѣе за прогреса и просвѣтата на широкитѣ народни маси. И нашата преса ще бѫде вѣрна на своето призвание, ако се показва не толкова скѫпа на колонитѣ си и ако помѣства повече статии не само за есперанто, но и за много други въпроси отъ такъвъ общественъ характеръ.

Kial la XVI ne okazos en Sofio?

Kiel ni jam sciigis, la Centra Komitato de la Konstanta Reprezentantaro decidis, ke la XVI okazu en Vieno kaj ne en Sofio. Laŭ la decido de la XIV (Helsinki, 1922), la C. K. rajtas fari definitivan decidon pri la loko de la universalaj kongresoj, dum la kongresoj mem esprimas per sia voto nur deziron.

El multaj lokoj de nia lando ni ricevis demandojn, bedaŭrojn kaj protestojn pri la decido de C. K. — Tio instigis nin doni la sekvantan klarigon pri la tuta demando:

La Centra Komitato de la Bulgara Esperantista Societo, konante la malfacilecon de la aranĝo de Universala kongreso, ne povis decidi facilanime inviti tian en nian landon, pro tio ĝi proponis al la X Bulgara Esperanto-kongreso, kaj la kongreso ja akceptis tiun ĉi proponon, ke B. E. S. invitu la XVI-an nur se la Registaro promesos doni subvencion de 100.000 lv., kiun sumon la C. K. konsideris necesa por la komencaj laboroj, kaj kiun ĝi estis petinta jam de la registaro per du skribpetoj (dum marto kaj dum junio, j. k.). Ĉar la registaro ne respondis al la C. K. ĝustatempe, niaj oficialaj delegitoj ricevis instrukcion de la komitato: se ili ricevos en Nürnberg telegrafan sciigon, ke la registaro donas la subvencion, en tiu okazo ili invitu la XVI-an.

Niaj delegitoj ne ricevis tian sciigon. Intertempe la bulgara ĝenerala konsulo en Dresden, kiu, laŭ la peto de B. E. S., repre-

zentis oficiale la Ministerion de la Popola Instruado publike deklaris, ke, se la XVI okazos en Sofio, li subtenos ĝin finance. La bulgaraj esperantistoj, ĉeestintaj la XVI-an, konsiderinte, ke la plej grava demando, kiu hezitigis la C. K. de B. E. S. inviti la kongreson, nome la demando pri monrimedoj, estas solvita, insistis, ke la oficialaj delegitoj de BES invitu la XVI-an en Sofion; ili faris la inviton kaj la kongreso akceptis ĝin. Tiu akcepto, kiel ni jam diris supre, havas valoron de deziresprimo, kaj post tio restis tasko de la CK de KK, kolektonte informojn pri la objektivaj cirkonstancoj, fari la definitivan decidon.

La CK de KK rilatis al la CK de BES. La lasta komitato ekagis pli energie kaj ricevis la sankcion de la registaro, kiu promesis ankaŭ monhelpon. — Tamen la interna politika stato, kiu okupis tre multe la registaron, malhelpis al ĝi preni tiun decidon ĝustatempe kaj respondi tuj al BES, pro kio ankaŭ BES devis doni al CK de KR malfrue sian respondon. Dume la CK de KR devis jam decidi; el Bulgario ĝi ne havis ankoraŭ definitivan oficialan respondon; la francaj kaj belgaj esperantistoj esprimis al ĝi deziron, ke la kongreso okazu en Vieno, ĉar Sofio ŝajnas al ili tro malproksima kaj ili ne povus partopreni la XVI-an; la Vienaj samideanoj deziris scii, ĉu la kongreso okazos en ilia urbo aŭ ne, ĉar la tempo fluis kaj la eventualaj preparaj laboroj por la kongreso devis komenciĝi. En la sama tempo en Bulgario okazis bedaŭrindaj politikaj tumultoj, kaj tio certe devis meditigi la eksterlandajn samideanojn, ĉu ne estas riske decidi kunvoki kongreson en landon, en kiu la interna situacio estas neklara.

En ĉi tiuj cirkonstancoj la CK de KR prenis sian decidon, kaj ĝi povis esti nur favora al la Viena invito. Ĉiu trovos tiun decidon plej racia.

Konsiderante, ke la motivoj, pro kiuj Vieno estas preferita en tiu okazo, estas seriozaj, kaj ke ĉiu agus sammaniere, kiel la membroj de la CK—KR, la CK de la Bulgara Esperantista Societo akceptis senproteste tiun definitivan decidon. Tiel devos ĝin akcepti ankaŭ la tuta bulgara esperantistaro, kaj, kiel ni jam alvokis ĝin, ĝi devos daŭrigi energie kaj senhalte sian pacan bataladon, por prepari certan grundon por invito de unu estonta universala esperantista kongreso en la bulgaran landon.

ESPERANTO-MOVADO.

Enlanda.

Radomir. — Fondita gimnaziana grupo „Fajrero“ kun 25 gelernantoj kiu aliĝis al B. E. S. Prez.: Iv. Mihailov; sekr.: Kiril St. Drajev; Kontrola komitato: Slavka Daskalova kaj Miĥ. D. Popov.

K.-Agaĉ. — Fondita „Sennoma Esperantista Societo“ de gimnazianoj kiu fervore ekagis.

Kemanlar. — La 14. oktobro okazis jarkunveno de la tiea esperanto-grupo „Progreso“. Oni konstatis la komunan deziron

pli vigle eklabori kaj per ĉiuj fortoj propagandi la lingvon. S-o P. Georgiev estas reelektita prezidanto, kiu restas ĉefa gvidanto de la grupo.

Varna. — La 20. septembro okazis la jarkunveno de la grupo „Frateco“ en la unuagrada lernejo „Sankta Naum“. Post la donitaj raportoj de la estraro kaj de la Kontrola komitato oni priparolis planon por estonta pli vigla kaj fruktodona agado. En la nova estraro estas elektitaj: prez.: Vas. Sim. Baĉvarov; vicprez.: s-ino Zl. Apostolovska; sekr.: f-ino Z. Mladenova; kas.: G. Nikolov; helpantoj: Vasil Iliev, f-ino El. Begajeva kaj f-ino Mara Andreeva.

Oni elektis ankaŭ lektorojn: s-o G. Karanĝulov por la knaba gimnazio; f-ino Zl. Apostolovska por la knabina gimnazio; s-o V. S. Baĉvarov por la Maŝina lernejo kaj f-ino Z. Mladenova por urbanaj kursoj.

Estis nomitaj ankaŭ komitatoj por la estonta agado de la grupo por: referajoj, deklamajoj, muzikajoj, teatrajoj kaj kolekto de abonoj por „B. E.“

Sofia. — Nia movado en la ĉefurbo signis novan sukceson, kiu tre influos la plivigligon de la interesperantista vivo en Sofia. La iama studenta esperanto-grupo estas renovigita. Okazis fondiga kunveno dimanĉe je 28. oktobro en la universitato. Ĉeestis pli ol dudek gestudentoj el la ŝtata universitato kaj Pentrista kaj Muzika Akademioj. S-ano Gunĉo Gunĉev skize ekspozis la staton de la internacia esperanto-movado kaj de la Internacia Studenta Ligo kies nacia sekretario por Bulgario li estas.

Oni elektis prezidanton Georgi Vartolomeev kaj sekr.-kasiston Gunĉo Gunĉev kaj decidis en plej proksima tempo aranĝi kurson por studentoj kiu kurso estu antaŭata de referajo pri esperanto.

— Kurso aranĝita de la legejo „Aleko Konstantinov“ en Poduene estas gvidata de Ang. Temelkov. 42 kursanoj.

Sviŝtov. La dekan de oktobro okazis nia jarkunveno. Post la raporto de la malnova estraro oni elektis novan, nome: prez.: Hristo Gunĉev; vicprez.: Vasil Cankov; sekr. Ivan Davidov; kas.: Ivan Gunĉev; bibl. Boris Bojinov kaj kontrolan komitaton: Toŝkov Nikola, Milko Lukanov kaj Tinĉo Kapukazanov.

Nia movado komencis grandpaŝe progresi en Sviŝtov. En plej baldaŭa tempo estos malfermotaj 4 kursoj kun 60 kursanoj. Multaj interesiĝas pri Esperanto. Grandan kaj sukcesplenan propagandon ni faris per la alvoko de L. E. S. en Sofio.

La adreso de nia grupo estas la sama: Hristo Gunĉev str. „Minska“ 2, por grupo „Zamenhof“.

Sevlievo. — La 13-an de oktombro nia agema okklasano Ganĉo Dekov legis referajon pri la morala valoro de Esperanto kaj ĝia utilo por la studado de la fremdaj lingvoj; ĉeestis pli ol cent gelernantoj, ĉe kiuj entuziasmo pri Esperanto estas granda. Baldaŭ estos malfermita kurso kaj la sesklasanoj havos lektoron.

T.-Pazarĝik. — La esperanto-grupo „Verda Stelo“ viglege agas por esperanto. Per diversspecaj alvokoj disdonataj al la

urbanaro oni sciigas la komencon de esperanto-kurso komence de 22. oktobro.

Belogradĉik. — Je 24 oktobro okazis jarkunveno de la grupo „Nova Societo“. Elektita nova estraro: prez.: Ivan Bogdanovski; sekr.-kasisto: K. Konstantinov; bibl.: Iv. Simeonov. La nova adreso de la grupo estas: K. Konstantinov, Belogradĉik.

Ŝumen. — Laŭ reciproka interkonsento en la estraro de la grupo estiĝis jena ŝanĝo: kasisto: s-o Kiril Bogutinski kaj bibl.: f-ino Stojanka Spirdonova.

Eski-Ĝumaja. — Nova grupo elkreskis „Verda mateniĝo“. Prez.: D. Mihalev; subpr.: G. Bojĉev; sekr.-kas.: Janko D. Kovaĉev kaj lektoro: G. Tahĉiev.

SCIIGOJ — ИЗВЕСТИЯ.

De la Centra Komitato.

La Centra Komitato en sia kunsido de 30. oktobro konsiderante la maleblajojn por sukcesa Balkana Kongreso en Sofia antaŭ la XVI Mondkongreso rezignis ĝian kunvokon kaj decidis definitive ke la XI-a Bulgara Esperanto-Kongreso okazos en Ruse. La dato estas fiksota poste, kun konsidero al la dato de la Universala Kongreso.

— La C. K. en sia kunsido de 9. oktobro (prot. № 8) okupis sin pri la petskribo de la Esperantista Koopera Societo en Bulgario kaj studinte la statuton de la lasta decidis: Inter ambaŭ organizajoj ekzistos rilatoj de intima kunlaborado. Ĝi sankciis la decidon de la Koopera Societo, ke „Bulgara Esperantisto“ estu ankaŭ oficiala organo de la lasta.

— Subtenantaj membroj. Laŭ la ŝanĝoj faritaj en la societa statuto de la X kongreso, la Societo akceptas ankaŭ subtenantajn (individuajn) membrojn. Tiuj povas esti ne esperantistoj, kiuj dezirante helpi materiale la laboron de la lastaj pagas kotizon pli grandan: minimume 20 levojn monate.

Ĝis nun aliĝis:
Conko S. Conkov, komercisto el Sofio kun 30 levoj monata kotizo;
Mois A. Semo, komercisto el Sofio kun 25 levoj monata kotizo;
Prof. D-ro Jos. Fadenchecht kun 30 levoj monata kotizo.

Samideanoj varbadu subtenantajn membrojn!

De la Koopera Societo.

La Komitato de la Koopera Societo estas: prez.: Atanas D. Atanasov, sekr.-kasisto: Dim. Simeonov, membroj: Georgi Fandikov, Kiro Georgiev kaj Boris Panĉev.

— La registrigo de la Koopera Societo en la Komerca Registro de la Sofia distrikta Juĝejo estas publikigita en la „Ŝtata Gazeto“ (Drĵaven Vestnik) № 124 de 1. septembro 1923.

— Estas sub presado kaj aperos je la fino de la monato la novelo de Elin Pelin „La Familio Gerak“, tradukita de Atanas D. Atanasov.

До

560. ШУМЕН - Илия Силвестриев,
ул. Паиси 28.

De la sekretario.

Pro foresto de la sekretario-kasisto dum unu semajno post la 24 novembro, la samideanoj kiuj dumtempe sin turnos al la Societo estas petataj ne koleri pro ioma malfruiĝo de respondo aŭ plenumo de mendo.

— Тъй като печаторезача повиши цената на изработванитѣ печати, то за въ бждеще групитѣ, които порждчватъ печатъ трѣбва да предплащатъ по 80 лева вместо 65.

De la redakcio.

La unua numero de „B. E." estas elĉerpita kaj la novaj abonantoj ricevos la gazeton komence de la dua numero. Ankaŭ de la dua numero restis tre malgranda provizo kaj nur ne multaj novaj abonontoj povus ĝin ricevi.

La abonantoj dum la nova jaro kreskis neatendite multe kaj surprizis la redakcion.

De la Aranĝa Komitato de la X-a Kongreso.

La samideanoj povas havigi al si la grandajn fotografajojn, faritaj dum la kongreso en Tirnovo, de la loka esperantista grupo kontraŭ 60 levoj. La fotografisto faris senteblan oferon rabatinte 20 levoj de la antaŭa prezo, donante eblon ankaŭ al pli malriĉaj samideanoj aĉeti tiun ĉi belegan kaj havindan memorajojn pri la sukcesa DEKA. Adreso de la grupo: Georgi Donĉev, str. Gurko 389, Tirnovo.

Diversaj.

— Je la fino de la monato kuranta aperos en esperanta traduko „La familio Gerak" de la fama bulgara rakontisto Elin-Pelin, traduko de nia samideano Atanas D. Atanasov kaj eldonata de la Esperantista Koopera Societo.

Por antaŭmenditoj (ĝis la 10. decembro) la libro kostos 12 levojn antaŭpagite. Post la apero de la libro la prezo plialtiĝos.

Поправка.

Погрешно е съобщено въ първитѣ броеве на списанието, че абонамента на „Literatura Mondo" е 120 лв. годишно; той е 150 лв. Нека съмишленицитѣ си вematъ бележка отъ това.

Redakcia Komitato:
At. D. Atanasov, Pan. At. Kolev
Dimitr Simeonov
Adreso de la redakcio: Sofio (Bulg.), bul. Maria Luiza, 46.

София, Печатница „Либерални Клуб" — Б. А. Кожухаров. Телефон 1984